

Johann Wolfgang von Goethe,  
Same tiel

*tradukita de Richard Schulz*

Super ĉiuj montoj  
Trankvil',  
Kaj ĉiuj fontoj  
Sen babil';  
Aŭdas vi ne  
Birdetan ĉirpon arbare.  
Pensu prepare  
Pri la pere'!

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)*

*Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

Johann Wolfgang von Goethe,  
Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —  
silent',  
tra pinopingo  
la senvent'  
spiras sen fort';  
arbare la birdoj ekmutas.  
Pretu, aludas  
silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).*

*Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.*